



Grupo Esperantista de Bilbao

Barrencalle Barrena, 7-1^a deks.
48005-BILBAO (Hispanujo)

✉ Redaktas:

Jesús-Miguel García Iturrioz



Kunven-tago:

Vendredo (19:30-21:00 h.)

☎ 619.694.683 (Iciar)

☎ 658.709.087 (Jesús)

✉ esperantobi@gmail.com

(La E-Grupo de Bilbao estis fondita la 20an de majo de 1906)

TTT-ejo: <https://sites.google.com/site/esperantobi/home>


En Fejsbuko, serĉu "esperanto grupo bilbao"

Jar-kotizoj: Normala: 60 €. • Familia: 70 €. • Juna (ĝis 30 jaroj): 20 €.

KUTXABANK-konto (IBAN-kodo): ES44-2095-0023-5122-1800-1550

JANUARO-MARTO 2026

Nro. 146 (1/26)



Danke al nia amiko Patxi de la Hoz, ni jam havas belan kongresafiŝon.

Zamenhofa festotago en la E-Grupo de Bilbao.



La vendredon 12an de decembro ni renkontiĝis en nia sidejo por kunmemori la naskiĝtagon de Dro. Zamenhof.

Ĉirkaŭ 12 homoj ĉeestis la kunvenon, inter ili juna francino, kiu troviĝas en Bilbao.

La kunsido taŭgis por informa parolo pri la ĉefaj okazintaĵoj dum la jaro 2025, kiuj estis sufiĉe abundaj.

Ankaŭ por informa ronda tablo pri la kongreso de 2026 en Portugalete.

Kaj kiel fino, komuna manĝo kaj daŭrigo de interparolado.

Daŭrigas la demarŝojn por atingi la plenan proprajnon de nia sidejo.

Jam alvenis marto kaj pasis preskaŭ unu jaro kaj duono de kiam ni komencis la demarŝojn por fariĝi proprietuloj de nia sidejo.

Feliĉe juĝistino jam eldiris verdikton favoran al nia peto kaj nun restas plenumi diversajn formalajn, kiuj ankaŭ postulas tempon (kaj grandan paciencon el nia flanko). Tamen ni esperas baldaŭ ricevi la novaĵon, ke la afero tute solviĝis.

Kongresafiŝo.



Kiel vi povas vidi sur nia frontopaĝo, ni jam havas belan kongresafiŝon danke al laboro de nia amiko **Patxi de la Hoz**.

Li ankaŭ realigis afiŝegon por fotovoko ("photocall"), kiu estos starigata ĉe la enirejo de la kongresejo por tiuj, kiuj deziras foti antaŭ ĝi kaj porti hejmen belan memoraĵon pri Portugalete kaj pri la kongreso.

Alie, Patxi okupiĝos ankaŭ pri dezajno kaj presado de la identigiloj. Ni planis aperigi sur ili la flagon de Portugalete.

Kunvenoj por organizi la kongreson.

La grupo, kiu stariĝis cele al organizado de la kongreso, kunvenas pli malpli unu fojon monate. Krom tio, ĝiaj membroj kreis vacapan grupon per kiu pli ofte kaj pli rapide oni informas pri novaĵoj, kiuj rilatas al la kongreso.

Se vi deziras engaĝiĝi al kongresorganizado, skribu al retadreso de la kongreso (portukongreso@gmail.com) kaj vi estos aldonita al vacapa grupo.

Forpasis.



Post sufiĉe da tempo sen novaĵoj pri li, en decembro ni sciis pri forpaso, “antaŭ unu jaro kaj duono”, de nia kara amiko **José Angel Trueba Valdeate**.

Tre aktiva antaŭ multe da jaroj, li apartenis al la estraro de nia E-Grupo kaj partoprenis vojaĝojn al diversaj E-aranĝoj.

Dum la lastaj jaroj li suferis okulmalsanon, kiu preskaŭ blindigis lin, sed neniam forlasis optimismon.

Antaŭ ĉio ni adiaŭas tre bonkoran homon.

Sukcesa kristnaska loterio.



Nekredeble, sed ĉijare, post multe da jaroj de malsukceso, nia numero estis premiita en la tradicia kristnaska nacia loterio.

Ĉiu ludanto rajtis ricevi po 5€ por ĉiu eŭro ludata, t.e., ĉiu bileto ricevis 20€.

La mono estas jam sendita al diversaj esperantistoj, inter ili kelkaj eksterlandanoj.

Ni esperu atingi denove premiojn en venontaj jaroj.

Nova monhelpo de “Fondaĵo Esperanto”.



La pasintan jaron 2025an, unu fojon plian, nia E-Grupo ricevis monhelpon de “Fundación Esperanto”, kies sidejo troviĝas en la urbo Zaragozo. Al ni alvenis 500€.

Koran dankon al nia kara amiko Lorenzo

Noguero, prezidanto de tiu fondaĵo.

En 2025, “Fundación Esperanto” disponis je multe pli da rimedoj ol kutime, ĉefe pro tre favora monrikolto el diversaj investoj. Tio permesis helpojn al diversaj E-asocioj tra la tuta Hispanio.

Por la nuna jaro 2026 oni antaŭvidas helpojn je 5.000€

Nia sociaro.

Je la 31a de decembro 2025, nia asocio nombris 56 membrojn.

Laŭlonge de 2005 estis 1 aliĝo kaj 4 ekziĝoj (3 forpasis kaj alia restas serioze malsana en maljunulejo).

PROVIZORA PROGRAMO (84a hispana kongreso)

Mardo 14/07

- 10:00/12:00 Akceptado de kongresanoj.
11:00/12:00 Prelego pri Portugalete kaj informoj diversaj (Jesús M. García).
12:00/13:00 Bilbaoaj kantoj (Rafa Blanco).
12:00/13:00 Bilanco de 8 jaroj de E-kursoj en UNED (Félix Jiménez).
15:30/17:30 Marŝado tra Portugalete (Eliro el kongresejo).
18:00/20:00 Interkona vespero. Lunĉo.

Merkredo 15/07

- 10:00/11:00 Prestiĝo de Esperanto (Alexander Zdechlik)..
10:00/12:00 Libroservo.
10:00/12:00 Akceptado de kongresanoj.
11:00/12:00 Du esperantistoj inter la unuaj eŭskaj ministroj (Toño del Barrio).
11:00/12:00 Mallonga kurso pri eŭska lingvo-1 (Rafa Blanco).
12:00/13:00 Malfermo de la kongreso.
13:00/13:15 Komuna foto ĉe la ĝardeno antaŭ la kongresejo.
15:30/18:00 Marŝado ĝis Sestao - Alta forno.
aŭ
Suprenirado piede al monto Serantes (452 m).
20:00/21:00 Muzika vespero ĉe la preĝejo de Sankta Maria.

Ĵaŭdo 16/07

- 09:30/11:00 Magio (T. Badía/M. Burrutxaga).
09:30/11:00 Konversacia rondo-1 (Dalia Pileckiene).
10:00/12:00 Libroservo.
11:00/12:00 Artefarita Intelektio (Patxi de la Hoz).
11:00/12:00 Mallonga kurso pri eŭska lingvo-2 (Rafa Blanco).
12:00/13:00 Unamuno kaj origamio (Susana Zabaco).
12:00/13:00 Komiksoj en Esperanto (Eduardo Berdor).
15:30/18:00 Marŝado tra Getxo (*pr. Geĉo*).
aŭ
La Arboleda, antaŭa minista vilaĝo (Per publikaj transportoj (Buso+Kablotramo)).

Vendredo 17/07

- 10:00/11:00 Ĝenerala HEF-kunveno.
10:00/11:30 Konversacia rondo-2 (Dalia Pileckiene).
11:00/12:00 Mallonga kurso pri eŭska lingvo-3 (Rafa Blanco).
- 11:00/12:00 Kunveno de la HEF-estraro kun hispanaj E-grupoj.
12:00/13:00 Kongresa fermo.
13:00/13:15 Rea komuna foto ĉe la ĝardeno antaŭ la kongresejo.
- 15:00/19:00 Perŝipe el Portugalete ĝis Bilbao laŭ la rivero.
Suprenirado per kablotramo al monto Arxanda (251 m.).
Panoramo de Bilbao.
Vizito al malnova kvartalo de Bilbao.
Vizito al E-Grupejo. Lunĉo.

Sabato 18/07

- 09:00 Renkontiĝo ĉe la kongresejo. Enaŭtobusiĝo.
09:20/10:00 Vizito al La Arboleda, antaŭa minista vilaĝo.
10:30/12:00 Forĝejo El Pobal.
12:20 Gallarta (naskiĝloko de Dolores Ibárruri, "Pasionaria").
12:30/14:00 Muzeo pri minejoj.
14:30 Komuna adiaŭa bankedo en Portugalete.

EKSKURSOJ, LUNĈOJ KAJ BANKEDO.

Mardo 14/07.

- 15:30/17:30 Marŝado tra Portugalete (Eliro el kongresejo). Senpage.
18:00/19:30 Interkona vespero kun senpaga lunĉo. Loko: Municipa sportejo "Pando Aisia".

Merkredo 15/07.

- 15:30/18:00 Marŝado apud la rivero ĝis apuda urbo Sestao. Vizito de alta forno. Senpaga ekskurso.
Alternative, suprenirado piede al monto Serantes (452 m). Bela panoramo. Senpaga ekskurso.

Ĵaŭdo 16/07.

- 15:30/18:00 Marŝado tra apuda urbo Getxo (pr. Geĉo), la ekonomie plej altnivela urbo de Vaskio/Eŭskio. Oni devas transiri la riveron, do kunportu transportkarton "Barik". Prezo: inter 1,00 kaj 1,50 €.

Alternative, vizito al La Arboleda, antaŭa ministra vilaĝo, per publikaj transportoj (Buso+Kablotramo). Kunportu transportkarton "Barik". Prezo: inter 3,00 kaj 4,00 €

Vendredo 17/07.

15:00/19:00 Perŝipe al Bilbao laŭ la rivero (ĉirkaŭ 12 km).

Eliro el Portugalete; 15:00. Alveno en Bilbaon (proks.: 16:00 h.

Suprenirado per kablotramo al monto Artxanda (251 m.). Panoramo de Bilbao. Kunportu transportkarton "Barik". Prezo: ĉ. 2,00 €.

Vizito piede de la malnova kvartalo de Bilbao.

Vizito al la E-klubejo de Bilbao. Senpaga lunĉo.

Maksimuma nombro da partoprenantoj: 80 (laŭ alveno de pagoj).

Prezo: 10,00 €. (Inkluzivas ŝipon kaj lunĉon).

Sabato 18/07.

09:00 Eliro el Portugalete per buso.

09:20/10:00 Vizito al La Arboleda, antaŭa ministra vilaĝo.

10:30/12:00 Forĝejo El Pobal.

12:20 Gallarta (naskiĝloko de Dolores Ibárruri, "Pasionaria").

12:30/14:00 Muzeo pri minejoj.

Maksimuma nombro da partoprenantoj: 58 (laŭ alveno de pagoj).

Prezo: 20,00 € (inkluzivas buso, forĝejo kaj muzeo).

14:30 proks., tuj post la ekskurso. **Fina adiaŭa bankedo.**

Ĝi okazos en urbo Santurtzi (tre proksime de la kongresejo) ĉe "Batzoki".

Maksimuma nombro da partoprenantoj: 65. (laŭ alveno de pagoj).

Prezo: 35,00 €.

Veturado tra la tuta provinco Bizkajo (Bizkaia).



Por veturado ene de la provinco Bizkajo, varme ni rekomendas aĉeton de transportkarton "Barik". Karto kostas 3€. Aĉetebla ĉe la flughaveno, ĉe metrostacioj kaj ĉe multaj stratkioskoj.

Post aĉeto de karto, oni devas plenigi per mono. Por la kongrestagoj eble sufiĉos ĉirkaŭ 10€. Se bezonate, eblas replenigo.

Ĉiu karto povas esti uzata de kelkaj homoj. Ne forgesu uzi ĝin ankaŭ kiam eliras el veturilo.

Dum kelkaj kongresaj ekskursoj ni uzos tiun karton.

Ĝi validas por ĉiuj transportiloj: metroo, busoj, pendoponto kaj ŝipeto en Portugalete, trajnoj de nacia kompanio RENFE, bilbaoa urba tramo, montotramoj, eĉ por veturi al urbo Donostia/San Sebastián (120 km de Bilbao).

99a kongreso de SAT.

Kiel anoncite, la ĉi-jara kongreso SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda) okazos en la



hispana urbo Leono (León), de la 19a ĝis la 26a de julio, tuj post la hispana kongreso en Portugalete.

Ĝis la 22a de februaro estis jam 30 aliĝintoj.

Kongrestemo estos “Paco kaj militoj. Datreveno de la

hispana enlanda milito (1936/1939)”.

Internacia Junulara Kongreso en Katalunio.


Ĉijare estos alia internacia kongreso en Hispanio. La 82-a Internacia Junulara Kongreso de Esperanto (IJK) okazos en Katalunio, konkrete de la 9-a ĝis la 16-a de aŭgusto 2026 en kongresejo situanta en la urbeto Tiana, nur 15 km for de Barcelona.

Tio estos mirinda ŝanco por partopreni internacian etoson, ne nur por junuloj, sed ankaŭ por plenkreskuloj.

Eĉ dum ĝi eblos ĝui esceptan naturan fenomenon: la sunan eklipsion kiu estos videbla en la nordo de la iberia duoninsulo la 12-an de aŭgusto. Vidu pliajn detalojn ĉe la retejo <https://ijk2026.tejo.org/>.

(El interreto. Feb. 2026)

Nova eldono de la scienca kalendaro.



La Scienca Lerneja Kalendaro de la hispana Supera Konsilio por Scienca Esplorado (CSIC) denove havos esperantan version en la jaro 2026, jam por la kvina fojo. Memoru ke temas pri kalendaro kiu ĉiun tagon de la jaro memorigas eventon aŭ scienciston, kun aparta atento al diverseco. En tiu ĉi eldono estos eĉ du mencioj al Esperanto pro

kunmemoro de la naskiĝo de du esperantistaj sciencistoj, Paul Neergaard la 19-an de februaro, kaj Wasaburo Oishi, la 15-an de marto.

Vi povas ĝin trovi en la retadreso <https://digital.csic.es/handle/10261/411155>, el kie eblas elŭti belan pdf-forman dosieron.

La traduko de la kalendaro eblis danke al la kunlaboro de teamo kunordigita de Hispana Esperanto-Federacio, kun la subteno de aliaj latinamerikaj esperantistoj, kiujn ni dankas pro ilia kunlaboro.

(“La Bitbulteno” de HEF. Nro. 104. Jan. 2026)

Universala Kongreso 2028 en Kaŭno (Litovio).



La Prezidanto de Litova E-Asocio, Povilas Jegorovas, en decembro havis tri gravajn renkontiĝojn, ligitajn kun la invito okazigi en 2028 la 113an Universalan kongreson de Esperanto en Kaŭno, interalie kun la Prezidanto de la Litovia Parlamento, Juozas Olekas.

Legu prian artikolon en “La Ondo de Esperanto” ĉe <https://sezonoj.ru/2025/12/litovio-83/>
(*Vacapa kanalo “Esperanto”. 15/12/2025*)

Mesaĝo de UEA al UN okaze de la internacia virina tago, 8 Marto 2026

Okaze de la Internacia Virina Tago 2026, Universala Esperanto-Asocio (UEA), organizo en Konsulta Statuso kun la Ekonomia kaj Socia Konsilio de Unuiĝintaj Nacioj, salutas virinojn kaj knabinojn tra la mondo kaj reasertas sian engaĝiĝon antaŭenigi genran egalecon kaj virinajn rajtojn, kunlabore kun aliaj civilsociaj organizoj kaj internaciaj partneroj. (...)

Genra egaleco kaj plena partopreno de virinoj en ĉiuj sferoj de la vivo estas esencaj por justa kaj daŭripova evoluo. (...)

UEA atentigas ankaŭ pri la graveco de lingva justeco. Por ke virinoj kaj knabinoj povu plene partopreni en la politika, ekonomia kaj kultura vivo, ili bezonas egalan aliron al lingvaj rimedoj — inkluzive de edukado en la gepatra lingvo kaj aliro al pliaj lingvoj por internacia komunikado. Lingva malegaleco plifortigas aliajn formojn de malegaleco. Per la Internacia Lingvo Esperanto kaj ĝia tutmonda reto de parolantoj, la Esperanto-movado kontribuas al pli inkluziva internacia dialogo kaj al pli forta voĉo de tutmonda civila socio, inkluzive virinojn kaj knabinojn.

(*Gazetaraj Komunikoj de UEA. N-ro 1284. 2026-02-20*)

La 112-a UK okazos en 2027 en Melburno, Aŭstralio!

La Estraro de Universala Esperanto-Asocio (UEA) kun ĝojo anoncas, ke la 112-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) okazos en Melburno/Narm, Aŭstralio, de la 1-a ĝis la 8-a de julio 2027.

Post la sukcesaj kongresoj en Montrealo (2022), Torino (2023), Aruŝo (2024), Brno (2025) kaj Graz (2026), la movado denove transpaŝas kontinentojn por festi sian plej gravan jaran renkontiĝon.

La UK en Melburno havos apartan signifon: ĝi estos nur la duan fojon en Oceanio post la memorinda kongreso en Adelajdo en 1997, tiel ĝuste 30 jarojn poste la Esperanto-movado revenos al la kontinento! Tiu reveno simbolas la forton kaj daŭripovon de la internacia lingvo kaj montras la engaĝiĝon de UEA por certigi, ke la UK estu vere tutmonda.

(*Gazetaraj Komunikoj de UEA. N-ro 1270. 2025-12-05*)